

Boletín

Bulteno de Hispana Esperanto-Federacio.
Numero 372, septembro-oktobro de 2005.
56a jarkolekto.

REDAKTISTO

Manuel Pancorbo

KUNLABORINTOJ

Ángel Arquillos, Toño del Barrio, Paulo Branco, Jorge Camacho, Marcos Cruz, José María Galofré, Heidi Goes, Miguel G. Adúriz, Pedro Hernández, Ana Manero, Gonçalo Neves, Lorenzo Noguera, Manuel Parra, Alejandro Pareja, Jorge Pavón, Jordi Polo, Darío Rodríguez, Carol Sánchez, Lupe Sanz, Pedro Sanz, Santiago Sanz, Carmen Suárez, Antonio Valén.

ELDONAS

Hispana Esperanto-Federacio
C/ Rodríguez San Pedro 13-3º-7
ES-28015 Madrid
Telefono kaj faksilo: +34 914 468 079
✉ www.esperanto-es.net
✉ admin@esperanto-es.net

ESTRARO

PREZIDANTO: Augusto Casquero
VICPREZIDANTO: Lupe Sanz
SEKRETARIO: Carmen Suárez
KASISTO: Pedro Garrote
BULTENREDAKTISTO: Manuel Pancorbo
VOĈDONANTO: Luis Hernández
VOĈDONANTO: José María Galofré

SENDU VIAJN KONTRIBUOJN AL

C/ Molino de la Navata 7, 4ºB
ES-28420 Galapagar (Madrid)
✉ bulteno@esperanto-es.net

§ *Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la respektivaj aŭtoroj.*
§ *La redaktisto rajtas libere rifuzi ne petitajn artikolojn.*
§ *Retpoŝto estas prefera sendometodo. Surpaperaj kontribuoj riskas prokrastiĝi aŭ eĉ ne aperi.*
§ *Estas permesite republikigi la enhavon menciante la fonton.*

Presejo Gráficas Aurora, Zaragoza
Leĝa deponnumero: Z-334-90
Kompostita per programo Scribus laŭ GPL-licenco

El la redakcio

Nova epoko

La pasinta kongreso de HEF alportis plurajn ŝanĝojn. Inter ili, la renovigo de parto de la estraro. Ekde nun la prezidanto estas **Augusto Casquero**, antaŭe voĉdonanto, kaj, krome, tri novaj homoj enposteniĝis.

La redaktoro de tiu ĉi **Boletín** estas unu tia homo, kun la peza laboro sur siaj ŝultroj daŭrigi la laboron de nelaciĝebla sizifo de nia movado, **Miguel Gutiérrez Adúriz**, kiu brilege malstagnigis tiun ĉi revueton kaj dorlote bredis ĝin dum preskaŭ jardeko.

Kiel en ĉiu nova epoko, ĝin signos ŝanĝoj —aspektaj kaj enhavaj— kiujn mi esperas ke vi juĝu pozitivaj. Mi ankaŭ esperas ke vi indulgu la misojn kaj erarojn kiujn vi certe trovos.

Ĉi-numere la bultena enhavo memevidentas: la bedaŭrinda forpaso de la plej elstara tradukisto, ne nur de hispanlingvujo, sed de la tuta esperantistaro, nia karega **Fernando de Diego**, okupos grandan parton de la bulteno: la faktoj kaj datoj, kondolencaj notoj kaj, kiel luksaĵo, la sincera nekrologio "*La oldulo kaj l' amaro*", fare de la portugala beletristo, ano de la ibera skolo, **Gonçalo Neves**.

Kaj, kompreneble, plus la informo pri la 64a Hispana E-Kongreso ĉirkaŭ la jubilea kiŝota jaro, entute tio "*prenos tri kvaronojn de nia enspezo*". Do, mi esperas ke la neĉeestintoj revivu la neforgeseblan etoson de la alkalaa renkontiĝo, kun ties ekspozicioj, prelegoj, atelieroj, muzik- kaj film- prezentoj kaj kamarada sento, kiujn jam ĝuis la sepdeko da partoprenintoj.

"*La alian kvaronon konsumas*" mallongaj informoj pri aliaj eventoj, pri internaciaj someraj renkontiĝoj, pri agado ĉe Eŭropo, ktp.

Esperoplene salutas vin la nova redaktisto,

MANUEL PANCORBO

Enhavo

El la redakcio		Kondolencna noto de UEA	17
Nova epoko	1	<i>La oldulo kaj l' amaro</i>	18
Sur la kovrilo	2	Vortoj de Fernando	20
Elestrare		Enlanda agado	
La prezidanto parolas	3	Fundación Esperanto	21
Novaj estraranoj	4	Universitata agado	22
KOVBILE Nia kongreso		Publike	
Kia la kongres', tia la progres'	5	Prezento en Ateneo	23
Traduko donacita	7	Renkonte en Esperantujo	
Jarĉefkunveno de HEF	10	90a UK en Vilno	24
La kongreso en amasmedioj	11	Decidoj de UEA	25
Impreso de junuloj	12	Simpozio Nitobe	26
Kinregistrado en kongreso	13	IJK en Zakopane	28
Omaĝo al Fernando de Diego	14	Eŭropa agado	
KOVBILE Adiaŭ al Fernando de Diego		Pinta renkontiĝo	30
30a de Junio de 2005	16	J. Handzlik en EEU-kunsido	31



Sur la kovrilo Miguel G. Adúriz fiere montras al la publiko, dum la 64a HK, la memorplaton donitan al Óscar de Diego —fone sur la bildo—, frato de Fernando de Diego, okaze de ties omaĝa solenaĵo.

M. PANCORBO



Al

Fernando de Diego de la Rosa,

*tradukinto ne nur de "La inĝenia hidalgo
Don Quijote de la Mancha", kaj iniciatinto
de sekŭindaj padoj en la iberia beletrujo,
omaĝe kaj admire.*

64^a Hispana Esperanto-Kongreso
Alcalá de Henares 2005

La Prezidanto parolas


Nun ekas nova epoko en la historio de Hispana Esperanto-Federacio. Nova estraro estis elektita dum nia lasta kongreso en Alcalá de Henares. Novaj defioj troviĝas antaŭ ni.

Unue mi dezirus danki la antaŭajn estraranojn, kiuj lasis siajn postenojn sed ne sian helpon al novaj homoj, pro la bona, sukcesa, elstara laboro de ili farita dum multaj jaroj, kio rezultis en gravajn atingojn, kaj en prestiĝon de HEF ene de Hispanio kaj eksterlande.

Ne oni povas ĵeti tiun bonan laboron al la rubujo, kaj oni devas daŭrigi en tiu vojo, kun la sama entuziasmo kaj sindonemo.

Gravaj taskoj estontaj, laŭ mia opinio, estas la konstanta plibonigado de nia organo **Boletín**, de nia ttt-paĝaro, bona organizado kaj funkciado de nia CO en Madrido, plialtigo de la nombro de nia membraro (nun iomete hontiga, se ni konsideras la grandon de nia lando), bona financa administrado (ne nur librotendo, sed ankaŭ kapablo atingi subvenciojn kaj aliajn finacajn rimedojn, kiuj ne estu nur kotizoj de niaj membroj, por ke, laŭ frazo de nia iama Prezidanto, Antonio Alonso Núñez, *la mono por la movado ne estu melkita el la movadanaj poŝoj*).

Ne mapli grava estas la plilarĝigo kaj plioftigo de la kontaktoj kaj kunlaboroj



inter HEF kaj la lokaj kaj regionaj asocioj, inter la asocioj mem, inter la membroj mem. HEF ne devas esti insulo, izolita de la movado, sed grava parto de ĝi. Ekzistas en nia movado, en landaj kaj internaciaj asocioj, fenomeno tia ke kelkaj asocioj kaj iliaj instancoj kaj funkciuloj profitas de la movado, kaj ne la movado devas esti ekzemplo de bona funkciado kaj de servo al siaj membroj.

Oni devas batali por ke tiuj rilatoj kun niaj membroj estu fluaj, kaj starigi aŭ plibonigi la rilatojn kaj kunlaboron kun aliaj gravaj asocioj kaj movadaj hom-

grupoj kiel UEA, EEU, ILEI, TEJO, kun niaj fratoj en Ibero-ameriko, kun niaj najbaraj landoj Portugalio kaj Francio, ktp. Mi havas la intencon serĉi respondeculojn por tiuj taskoj. Unu el ili specife dediĉita al fomento de interkontaktoj kun la lokaj kaj regionaj asocioj de Hispanio kaj inter ili mem. HEF ne estu iu sekto aŭ izolita homgrupo fermita en si mem, sed malferma al ĉiuj. Ne gravas la estraro, sed la membraro.

Por tiuj celoj mi petas volontulojn kiuj estu pretaj kunlabori en diversaj taskoj. Ĉiuj estas bezonataj. Bonvenaj estas ideoj, sed ideoj kun intenco plenumi ilin. Ideoj sen helpo ne funkcias. Mi atendas viajn sinproponojn.

Dankegon al eks-estraranoj!

Ana Manero
Manuel Parra
Miguel Ángel Sancho
Miguel G. Adúriz

Ne oni devas forgesi la gravecon partopreni en internaciaj aranĝoj. La Universala Kongreso en Vilnius estis vere malkuraĝiga. Nur dekvino da hispanoj aliĝis. Ni komparu kun nia najbara lando Francio, kun ĉirkaŭ 300 partoprenantoj. Simila situacio okazas kun partopreno en la ILEI-konferenco, kaj en aliaj gravaj E-aranĝoj. Ni devas kuraĝigi nian membraron pli ofte partopreni, kunlabori, havi postenojn kaj aktivadon en gravaj E-instancoj, pri kio la hispana movado momente lamas.

Mi estas tute certa ke la bona laboro farita de niaj antaŭuloj ne perdiĝos, kaj ekde nun ni ĉiuj denove kaj kun entuziasmo laboros por nia movado.

Kiel mia unua propono estas aliĝi jam al la Universala Kongreso kiu okazos venontjare en Florenco (Italio), kaj al la Internacia Konferenco de ILEI kaj kongreso de TEJO.

Mi antaŭdankas vin ĉiuj kaj mi restas je la tuta dispono de nia membraro.

AUGUSTO CASQUERO

Novaj estraranoj

La ŝanĝo en la estraro alportis tri novajn homojn, neniam antaŭe estraranojn. Ĉiuj tri estas madridanoj kaj en Madrido ili disvolvas sian agadon. Jen ilia sinprezento.

Lupe Sanz Bueno, vic-prezidanto



Ŝi esperantiĝis en 1981 kaj la sekvan jaron ŝi jam fariĝis Bibliotekisto de Madrida Esperanto-Liceo (MEL). Ekde 1982 ŝi estas estrarano de MEL (Prezidanto kaj Sekretario, posteno kiun ŝi havas nun). Ekde 1986 ŝi redaktas la flug-folion *Nia Voĉo*, organon de MEL.



Carmen Suárez Fernández-Cid, sekretario

Ŝi lernis esperanton ĉe *Club Amigos de Unesco* de Madrid en 1985, kaj membriĝis en MEL unu jaron pos-

te. En 1987 ŝi estis elektita Sekretario de MEL kaj ĝis nun ŝi estas membro de ĝia estraro, ekde 1997 kiel Prezidanto.

Manuel Pancorbo Castro, bulten-redaktisto



Li komencis lernadon de Esperanto en 1995, per interreto, kaj aniĝis en HEF kaj UEA la sekvan jaron. En 1997 li enlistiĝis en *Pasporta Servo* kaj regule gastigas eksterlandajn samideanojn. Lia e-agado ĉefe realiĝas per reto, tamen li aktive kunlaboris kun pasinta HEF-estraro en projektoj kiaj "Expolingua" kaj la HEF-kongresoj de 2000 kaj 2004. Li reprezentis HEF-on en la EEU-kunsidoj dum la UK de Berlino (1999). Ekde 2003 li redaktas la rubrikon "Scienco" de la revuo *Monato*.

Bonan ŝancon al ĉiuj!

Kia la kongres', tia la progres'

ANA MANERO

La sidejo de nia ĉijara kongreso situis en Alcalá de Henares, apudmadrida urbe-to, iama lulilo de Miguel de Cervantes, kiun la organiza skipo elektis ĝuste tial por pli bone disvolvi la kongresan temon “Donkiĥoto parolas esperanton” en oportune kultura kaj institucia etoso.

Institucia apogo

Prezentinte dosieron pri la kongresaj celoj, kaj ĝenerale pri la *Projekto Kiĥoto-2005*, HEF ricevis kontentigan apogon de la urbaj aŭtoritatoj. La urbeŝtaro de Alcalá disponigis taŭgan kongresejon, la tiel nomatan *Servicio Municipal de Archivo y Biblioteca* (fakte publika biblioteko). Ĝi peris nian kontaktadon kun la lokaj amasmedioj, rezulte de kio okazis pluraj radiaj intervenoj, vizito de loka televido, kelkaj gazetaj artikoloj kaj ĉeesto de ĵurnalistoj dum la kvar kongresaj tagoj. Ĝi ankaŭ provizis kvalitan turisman materialon kaj po du



Toño del Barrio, la vicurbestro Luis Fuentes, Ana Manero kaj Manolo Parra sur la podio dum la inaŭguro
ÁNGEL ARQUILLOS

hispanlingvaj libroj, kiuj aldoniĝis al la ekzemplero de *La inĝenia hidalgo Don Quijote de la Mancha* ricevita de ĉiu kongresano. Fine ĝi organizis gvidatan turisman viziton tra Alcalá de Henares.

La malfermon de la kongreso ĉeestis la vicurbestro Luis Fuentes, kiu ricevis donace de HEF manplenon de esperantaj libroj, por kompletigi la esperantan branĉon de la gastiga biblioteko inaŭguritan antaŭ la kongreso per ekzemplero de Donkiĥoto; kaj la fermon, José M^a Nogales, direktoro de



M.A. Sancho surkribas honorlibron
MANUEL PANCORBO

la ejo, kiu je la fino petis de nia prezidanto subskribi en la honorlibro de la biblioteko, kaj invitis al posta aperitivo, komplezo de la urbo al la kongreso.

Jubilea kongreso

Nu, kia estis nia kongreso? Krom sukcesa el institucia vidpunkto, ĝi estis jubilea. Ja en 2005 oni celebras centjariĝon de la unua esperantokongreso en Boulogne-sur-Mer (1905), de publikigo far Einstein de fasko de artikoloj revoluciantaj Fizikon (1905), kaj ĉefe, de la unua eldono de *El Quijote* antaŭ jam 400 jaroj.



donkiĥoto parolas esperanton



Boulogne-sur-Mer, 1905 (☞ boulogne2005.online.fr)

ORGANIZA SKIPO

Administrado kaj programo

Ana Manero

Kongresejo kaj ekstera informado

Manuel Pancorbo

Retinformado al e-medioj

Darío Rodríguez

Kongreslibro

Miguel Gutiérrez Adúriz

TTT-paĝo

Miguel Ángel Sancho

Grafika aranĝado

Cristóbal Aparicio kaj David Trigo

Interinstituciaj rilatoj

Toño del Barrio

Aliaj kunlaborintoj

Lupe Sanz, Alejandro Pareja,

José Rodríguez, Manuel Parra kaj ceteraj anoj de la retlisto "HEF-esperanto-aktivado".

Pri la du unuaj prelegis respektive Darío Rodríguez (*Naskiĝo de lingvo: de Bialistoko al Bulonjo*) kaj Manuel Pancorbo (*1905: la revolucio de Einstein en Fiziko*). La tria aldonas esencan trajton al nia kongreso: ĝi estis krome do, kiĥota.

Kiĥota kongreso

Sed ĉi ĉefa temo tiel intime implikiĝis kun aliaj, ke epitetoj kiaj malferma, astronomia kaj omaĝa trafe priskribas aliajn ecojn de la programo.

La prelego *El Quijote imaginado* (La imagita Kiĥoto) far Amelia Fernández, instruisto de la Madrida Aŭtonoma Universitato estas dusen-



Amelia Fernández
A. ARQUILLOS

ce malferma. Unuflanke, la organiza skipo volis inviti fakulon pri la ĉeftemo el la universitataj rondoj; aliflanke —ĉar hispanlingva— la prelego estis ĉeestbla de la ekstera publiko. Ankaŭ ĉar malferma, la civitanaro de Alcalá havis



Desegno farita de Andreu Ballester Camacho, 8-jaraĝa, el Majorko, por la konkurso

la ŝancon viziti —de la 1^a ĝis la 15^a de julio— la ekspozicion *Tia mi vidas Donkiĥoton*, kiu konsistis el la ricevitaj kontribuoj okaze de la infana samtitola desegno-konkurso lanĉita de HEF kadre de la Projekto Kiĥoto-2005.

Astronomiaj programeroj

David Galadí enkondukis nin en astronomian vesperon per sia prelego *Sancho legas la horon en la ĉielo: priastronomiaj komentoj al la 20^a ĉapitro de la unua parto de Donkiĥoto*.



David Galadí gvidas stelrigardadon


PEDRO SANZ

Nokte ni havis la ŝancon praktike lerni tiun metodon legi la horon per la steloj dum stelrigardada nokto gvidate de la preleginto. Kaj inter tiuj du menciitaj programeroj, Pedro Vilarroig prezentis sian Kosmologian Suiton, kies kombino de muziko kaj elkomputilaj bildoj pretigis la animon por la posta stelobservado.

Pluas la kiĥotad'

En rilato al la kiĥota ĉeftemo ankaŭ menciindas la prelegoj *La Kiĥoto kaj ĝiaj esperantaj tradukoj* kaj *Gigantoj kaj muelejoj de Esperantujo*, respektive far Toño del Barrio kaj Jorge Camacho. Kaj la prezento de la *Projekto Kiĥoto-2005*, far Miguel Ángel Sancho. Kaj kompreneble, la donacado kongreskadre de ekzemplero de *Donkiĥoto* al la Muzeo-Domo de Cervantes en Alcalá.

Kaj, fine, Fernando de Diego, tradukinto de *Donkiĥoto*, ricevis omaĝon kadre de la kongreso. Ni volis ĝin festa, sed fato postulis ĝin funebra: Fernando forpasis la 30an de junio, dek tagojn antaŭ la omaĝo. Vidu apartan raporton pri la omaĝo sur paĝo 14.



...kaj mi kredas, ke ne ekzistos regno, en kies lingvon oni ne tradukos ĝin...

Jen ĉerpaĵo de la mirinda traduko de Fernando de Diego. Ĉu vi volas trovi pliajn? Konsultu la retejon pri la Projekto Kiĥoto 2005

☞ 213.172.47.103/quijote/

Traduko donacita

La Muzeo Naskiĝdomo de Cervantes en Alcalá de Henares estis scenejo de unu el la plej sukcesaj eventoj de nia 64a Kongreso.

DARÍO RODRÍGUEZ

La 7an de julio vespere, Toño del Barrio, nome de Fundación Esperanto, solene transdonis la esperantan version de La inĝenia hidalgo Don Quijote de la Mancha al la ĝenerala direktoro de Arĥivoj, Muzeoj kaj Bibliotekoj de la Madrida Komunumo, S-ro. Álvaro Ballarín. Li esprimis per verva paroladeto sian dankemon pro la donaco ricevita, emfazante ke ĝi pliriĉigos la grandan kolekton de eldonoj de Don Quijote ekzistanta en tiu Muzeo, nun en 33 lingvoj, post la donaco de la esperanta volumo. Ambaŭ parolantoj emocie omaĝis la memoron de ĝia genia tradukisto Fernando de Diego.



S-ro Ballarín trafoliumas la tradukon gvidate de Direktoro de Fundación Esperanto, Toño del Barrio
SOFÍA MENÉNDEZ

Malgraŭ la intensa varmo, ĉestis la ceremonion en la Domo de Cervantes multaj kongresanoj, kiuj entuziasme aplaŭdis la paroladojn.

La evento estis reliefigita en pluraj retaj kaj paperaj ĵurnaloj kaj estis filmita fare de loka televido.

Beletra kongreso



Jorge prezentas siajn poemarojn

M. PANCORBO

La kongreso estis ankaŭ beletra. Unue, prezentado de novaj libroj: *Saturno kaj Celakantoj* de Jorge Camacho; *Esperanto en Katalunio* de Antonio Marco Botella; kaj *Makako kaj Antonio* de Alfredo Gómez Cerdá, esperantigita kaj ilustrita de Pedro

Ullate.



Tradukateliero

M. PANCORBO

Due, tradukateliero gvidata de Liven Dek. Trie, *Esperanto en literaturo kaj literaturo en esperanto*, ekspozicio konsistanta el du partoj; citaĵoj el hispanlingva beletra menciataj esperanton kaj aro de elektitaj libroj pruntitaj el la Biblioteko Juan Régulo Pérez de HEF. Samkiel la alia ekspozicio, libere alirebla de la loĝantaro de Alcalá de Henares de la 1^a ĝis la 15^a de julio.



Kaj kina

Al la du enprogramitaj eroj —prezentado de la komerca filmo de Ramón Barea kaj Álex Angulo *La pedalaŭto*,



Andrea, kinstelulo

P. SANZ

subtitolita en esperanto kaj la dokumentaj filmoj de Roman Dobrzynski *Sieĝoj de Malborko* kaj *Valencio en fajro*—spontanee aldoniĝis la dumkongresa registrado de ĥor-preĝo en

esperanto por kurta filmo *Hejmo* nuntempe realigata de la juna reĝisoro Pedro Homero; plu legu sur paĝo 13.

Kaj ankaŭ kleriga

Per la kurso Enkonduko en esperanton, senpaga por la civitanoj de Alcalá kaj gvidata de Pedro Hernández; kaj per la Seminario pri dubosolvado (iasence progresiga kurseto) sub la gvido de Antonio Valén.



Kurso de esperanto

M. PANCORBO

Ĉu vi ŝatas la fotojn de la kongreso? Estas multaj pli en la retejo de HEF

 www.esperanto-es.net/congreso2005/galerioj/

Kaj junuleca!


Ne nur ĉar la partopreno de junuloj estas pli nombra ol kutime en HEF-kongreso-



Félix prezentas birdojn
M. PANCOORBO

Jordi Polo pri wikipedio
ÁNGEL ARQUILLOS

soj (parte dank' al speciala rabatita kotizo lastmomente enkondukita por esperanto-lernantoj), sed ankaŭ ĉar ili aktive kontribuis al la programo per diversaj atelieroj: *Enkonduko en ornitologion* (Félix Jiménez Lobo), *Enkonduko en eskapismon* (David Guerrero), *Vikipedio* (Jordi Polo) kaj *Presentado de junaj esperantaj aktivaĵoj* (HEJS), ĉi lasta mal-



David enkondukas skapismon
ÁNGEL ARQUILLOS



La junuloj aktivas! Kaj se vi volas ne maltrafi la agadon de niaj junuloj, gvatu la retejon de HEJS! Tie vi trovos informojn, forumojn... se vi ne tro aĝas, via aliĝo al HEJS jam malfruas!

 www.esperanto-es.net/HEJS

ferma ankaŭ al la ekstera publiko.

Kaj labora...

Kaj kompreneble ankaŭ labora: kunsidoj de la estraro, de HEF-anoj, pri ILEI kaj de SATEH.

Ĉu io ankoraŭ menciindas? Jes! Ni ne forgesu la libroservon de SATEH zorgata de Pedro Sanz. Ampleksa kaj kompleta kolekto de akirindaj varoj, kiu montriĝis sufiĉe profitdona.

Organiza vidpunkto

Kaj kio el la organiza vidpunkto? La kongreso estis esence kunlabora. La laborteamo konsistis ne nur el madridaj esperantistoj, sed ankaŭ el nemadridaj kaj neesperantistaj fortoj. En la unua kazo, Lorenzo Noguero, el Zaragozo, tre helpis en la demarŝado ĉe Fernando de Diego kaj en konkretaj agoj rilataj al Fundación Esperanto. En la dua, Cristóbal Aparicio, profesia dezajnistoj, senpage dezajnis la kongresafiŝojn, kies ĉefa bildo utilis ankaŭ por la konkurs-diplomo, por la omaĝplato al De Diego kaj, iom modifita, por la logoo de la Projekto.

Aparte dankindas la streboj de José Rodríguez, sen kies entuziasma entreprenemo la partopreno de junuloj ne estintus tiel sukcesa. Ceterajn skipanojn vi trovu sur paĝo 6.

Kaj jen venis fino al mia latino. Tute vanis mia intenco verki mallongan skizeton: ja vortoj posedas propran volon, ni submetiĝu do al ties tiraneco.

Jarĉefkunveno de HEF



Dimanĉon la dekan de julio, je deknua horo, la membroj de HEF havis rendevuon; temis pri la Ĝenerala Kunsido, tiu ĉiujara formaleca okazaĵo kie oni ĵetas superrigardon al la farto de la Federacio.

MANOLO PARRA

Ĉi-foje ĝi enhavis eron iom eksterordinaran: la renovigon de la estraro. Eblas konjekti, ke tiun matenon la mezuma hefano pesis kialojn jen por ĉeesti (“Ja mi volas tuj koni la novan estraron”), jen por ne ĉeesti la kunsidon (“Imagu, ke ĉiuj petegos min prezidantiĝi”). Nu, la nombro da partoprenantoj estis 25, ne malbona nombro, laŭ la kutimo.


Traktiĝis unue la ĉiamaj protokoletoj; denove ni konstatis ioman malkreskon de la membraro; ni ratifis la modifon de la statuto de Fundación Esperanto, aŭdinte la klarigojn far ĝia patrono Lorenzo Noguero. Kaj alveninte al la varma punkto, la prezidanto demandis por kandidatoj, pasis kelkaj silentaj sekundoj, kaj jen parolis Augusto Casquero. Li diris ke, kvankam tiu-ĉi ne estas bona solvo, por helpi HEF-on li kandidatas al prezidanteco kape de skipo jam konata (vd. paĝon 6).

La voĉdono rezultis... favora al tiu-ĉi kandidataro. Augusto proponis transdonon de UEA-komitataneco al Jesús Iturrioz, kion tiu lasta kaj tuta asembleo

ratifis.

Cetere, Oni notigis, ke mankas volontulo por la servo de informado al gazeta-ro; ali-oni sugestis que Fundación Esperanto eldonu hispanlingvan revuon, kaj ali-ali-oni petis ke ni ĉiuj daŭrigu la agadojn ĉirkaŭ la projekto “Kihoto-2005” ĝis jarfino, aparte je loka nivelo en ĉiuj urboj.

Fine, traktiĝis la temo de venonta kongresurbo.



Lorenzo raportas pri la agado de Fundación Esperanto
ÁNGEL ARQUILLOS

Neniun konkludon kunvenintoj atingis, sed sursceniĝis tri ebloj: ie en Ekstremaduro (se Kani engaĝiĝus), Barcelono (se la tieaj aktivuloj vidus klare la

eblon organizi ĝin dum la ferio-ponto de majo) kaj, kiel last-momenta solvo, Benikasimo.

La kongreso en amasmedioj

En la antaŭa semajno al la kongreso, estis lanĉita intensa gazetara kampanjo pri la kongreso, la ekspozicioj montrataj en la kongresejo mem kaj la e-kursoj.

MANUEL PANCORBO

Iom pli frue, pro la forpaso de Fernando de Diego (FdD), HEF inundis la novaĝ-agentojn per komunikoj pri la vivo kaj bedaŭrinda morto de la tradukinto de "El Quijote" en esperanton. Tial, la kombina efiko de ambaŭ proksimaj kampanjoj estis pli granda ol kutime. Krome, la gazetara servo de la municipo multe helpis allogi lokajn mediojn.

Konsekvence, la kongreso eĥis favore en pluraj amasmedioj. Estis intervjuoj al responsulo de HEF pri amasmedioj, Manuel Pancorbo, fare de *Cadena SER-Henares*, *Onda Cero Radio-Alcalá* kaj *Onda Cero-Madrid*. La demandoj estis pli-malpli tiuj kutimaj pri la nasko de la lingvo, pri la nombro da parolantoj, ktp; sed ankaŭ estis pluraj demandoj pri la traduko kaj tradukinto de "Don Quijote", kaj pri la kongreso kaj ties programeroj.

Localia Henares, loka televido, venis registri surloke la ekspoziciojn kaj intervjui la skipestron, Ana Manero, kaj la Direktoron de Fundación Esperanto, Toño del Barrio. Alia loka televido intervjuis pliajn aktivulojn kaj filmis la ekspoziciojn kaj tiaman programeron en la ĉefsalono. Surprize, anoncis sian alvenon la



programo *Madrid Directo de Telemadrid*; la kialo estas gazetara-noto, dissendita de la kina akademio kiu respondecas pri la projekto, kiu anoncis la registradon de voĉoj en esperanto por la kurtfilmo Hejmo;

sed ĵurnalistoj fuŝe komprenis la aferon ne voĉa, sed plena registrado (vida kaj aŭda) de kinaj scenoj en esperanto. Finfine ili elreviĝis kaj ne faris la raporton.

Al ĉiuj ĵurnalistoj estis disdonita broŝuro *Esperanto: dossier para periodistas*, prilaborita de Ana Manero kaj Toño del Barrio.

Ankaŭ en urbaj paperaj medioj la kongreso kaj esperanto eĥis. En *El País* (2005-07-07), en sekcio "Agenda", aperis anonco pri la donaco de "La inĝenia..." al Muzeo Naskiĝdomo de Cervantes, kaj en la senpaga ĵurnalo *Que* de sekva tago (2005-07-08), aperis pria noto.



Casa Museo de Miguel de Cervantes.

ALCALÁ
Un nuevo 'Quijote' traducido al esperanto
El Museo Casa Natal de Cervantes incorporó ayer a sus fondos un ejemplar de 'El Quijote' traducido al esperanto, que fue donado ayer por la "Qué"-jurnalo 2005-07-08

En interreto la reago estis eĉ pli multnombra. Jen ekzemploj:

- ☞ www.portal-local.com/acno_loc_not.asp?dato=6109
- ☞ www.elcultural.es/Quijote/noticias.asp
- ☞ www.profesionalespcm.org/_php/MuestraArticulo2.php?id=3620

Impresoj de junuloj

Entute aliĝis al la kongreso 67 homoj, ĉefe madridanoj (30) sed ĉeestis 6 eksterlandanoj. Plej bona novaĵo estas la partopreno de junuloj, ne multnombra, 12, sed duono estis novlernantoj! Jen kelkaj impresoj de ili pri la kongreso:

Jordi Polo, Alcalá de Henares

"Kiam mi unue sciis pri esperanto-kongreso mi pensis ke ĉi tie estos malpli ol 20 homoj. Mi ne pensis ke en Hispanio estas tiom multe da lernantoj de esperanto. Ankaŭ mi pensis ke ĉiuj parolas malrapide kaj malbone. Sed mi eraris.

Kiam mi eniris en la kongreson kaj parolis kun Ana Manero, min ŝokis tio ke ŝi parolas tre rapide, rapidege! Mi ne povus imagi ke iu kapablas paroli tiel rapide kiel ŝi. Post nelonge mi eksciis ke tre multe da kongresanoj parolas tre bone.

Prelegoj estis tre interesaj. Sed la plej granda bona surprizo estis la homoj. Nun mi pensas ke esperantistoj estas tre apertaj. Bonega komunumo kiu helpas aliajn homojn (kiel min) kiuj ankoraŭ ne parolas bone. Mi poste sciis ke kelkaj prelegintoj estis famaj homoj (en esperanta movado) sed ili parolis kun mi kvazaŭ mi estus ĉiama amiko.

Mi ridis, parolis kaj amuziĝis kun esperantistoj en esperanto. Kaj nun mi havas esperantistajn amikojn. Nekredeble!"

Carol Sánchez (Cailsa), Leganés

"La kongreso estis tre bona! Tre interesaj aktivaĵoj okazis, sed ĉefe la Kongreso estis bona pro la karaj kaj amuzaj kongresanoj.

Certe, mi ne atendis tiom da homoj! Nun, mi ne povas kredi kion oni diras



Cailsa, la plej juna kongresano
M. PANORBO

pri esperanto, ke ĝi estas morta lingvo. Por mi, la kongreso estis tre bona ŝanco por renkonti aliajn esperantistojn kaj praktiki la lingvon. Kvankam mi ankoraŭ parolas tre malbone, mi komprenis preskaŭ ĉion kion la homoj parolis, kaj tio definitive konvinkis min ke esperanto estas tre utila lingvo por komunikado inter la plurlingva homaro."

Jorge Pavón, El Escorial

"Ĝi estis mia unua kongreso kaj vera eniro en Esperantujo. Mi speciale ŝatis la stelrigardadon kaj la atelierojn pri eskapismo kaj tradukado. Sed tio, kion mi plej multe ĝuis estis la kontakto kun tre malsimilaj homoj, sed interesataj pri la sama afero. Do, bona okazaĵo por konstati, ke la lingvo estas tre viva."

Heidi Goes, Belgio

"Agrable okulfrapis min la fakto ke la temo de Donkiĥoto ankaŭ klare videblis en la kongresurbo mem, pro tio ke jam la tutan jaron okazadas en Hispanio eventoj festante la 400-jariĝon de 'La inĝenia hidalgo Don Quijote de la Mancha'.

Tamen, pri la kongreso mem, mi ne scias kial (aŭ ĉu ĉar mi jam atingis la sepan ĉielon pro iu 'nigra stelo'...?), sed mi plej vigle memoras la prelegon pri la legado de la horo en la ĉielo, kaj eĉ pli vigle la rigardadon al la luno, la planedoj kaj la steloj."

Kinregistrado en kongreso

La filmreĝisoro Pedro Homero kaj lia skipo profitis la kongreson en Alcalá de Henares por surbendigi parton de la sonbendo de la filmo Hejmo, kiun ili registris en Madrido en la pasinta monato junio.

ALEJANDRO PAREJA

Hejmo estas sciencfikcia kurt-filmo, tute parolata en esperanto. Post ol Homero turnis sin al HEF proponante lian ideon, kelkaj volontuloj kunlaboris en la tradukado de la dialogaron kaj en la instruado kaj trejnado de la aktoroj, ĉiuj neesperan-



Kongresanoj ekzercas kiel aktoroj

P. SANZ

tistoj. La bone konata redaktoro de Pola Radio en Esperanto, Barbara Pietrzak, afable registris kaj sendis la sonon de du el la plej gravaj roloj, tiuj de la rakontisto kaj la voĉo de la komputilo. Tamen, la reĝisoro bezonis “ĥoron” de almenaŭ 15 esperantistoj de ĉiuj aĝoj kaj seksoj por registri la voĉojn de la stelŝipanoj en grupaj scenoj.

Dudek partoprenantoj en la 64^a Hispana Kongreso de Esperanto partoprenis en tiu interesa sperto. Sub la lerta direkto de Pedro Homero oni registrigis la deklamadon de la “himno” de la stelŝipanoj, kaj poste la sonon de kelkaj scenoj en kiuj la partoprenantoj devis ludi la rolon de la stelŝipanoj kaj improvi-



Ĉia-aĝaj kongresanoj partoprenis la registradon

P. SANZ

zi frazojn de surprizo, ŝoko, ktp.

Ĉiuj partoprenintoj ricevos kiel memoraĵo DVDon kun kopio de la filmo.

Kelkaj volontuloj

Jen kelkaj volontuloj kiuj helpis la kinartiston pretigi la filmon por la registrado. De la traduko de la tekstoj ĝis la trejnado kaj kontrolado de prononcado aktoroj. Tradukintoj: **Manuel Ortega, José María Rodríguez, Víctor Manuel Macías, Manuel Pancorbo** (himno). Reviziinto: **Miguel G. Adúriz**. Instruisto de aktoroj: **Juan del Castillo**. Prononco-kontrolo: **Alejandro Pareja**. Kunordiginto: **Manuel Pancorbo**.

Gratulon al ili kaj al la volontaj improviziaj aktoroj dum la kongreso!

Omaĝo al Fernando de Diego

Vendredon, la 10an de julio, tagmeze, okazis la plej kortuŝa programero de la tuta kongreso, nome, la omaĝo al Fernando de Diego kiu, pro la forpaso de Fernando la 30an de junio, alprenis iom alian karakteron, evidente funebran sed ne mornan.

M. A. SANCHO K P. AUGURO

Ĉeestis lia frato Óscar kun siaj edzino kaj filo kaj ĉi ties du gefiloj. Dum la atendotempo, ili emocie trarigardis la ekspoziciojn, kie multaj el liaj tradukoj kaj originalaj verkoj kuŝis trans la montrovitroj. Estis videbla iliaj fieraj rigardoj, kaj sentebla ilia feliĉo, dum ili konstatis la estimon de la esperantlingva komunumo hispana al Fernando.



Familianoj de FdD sidas en la unua vico

M. PANCORBO

Parolvico por la Ibera Skolo

Tuj poste komencis en la ĉefsalono la omaĝo mem Unue Antonio Valén detale prezentis la verkojn tradukitajn de Diego laŭlonge de la jaroj, kaj rakontis anekdotojn el sia iama vizito al Karakaso por la finpretigo de *Gran Diccionario Español-Esperanto* (GDEE).

Sekvis Miguel Gutiérrez / Liven Dek, kun rememoroj pri la tempo kiam li konatiĝis kun Diego kaj ĉi ties efektive tre instruaj korektoj kaj komentoj al liaj unuaj tradukprovoj el la hispana. Poste Salvador Aragay, ekirante de sia unua



Antonio prezentas la verkojn de De Diego

M. PANCORBO

renkontiĝo kun Diego pro la eldonado de *La familio de Pascual Duarte*, prezentis la paradokson, ke oni plu nomas "neologismoj" vortojn, kiuj sidas en la lingvo jam de tuta jarcento, kaj kiujn de Diego lerte kaj trafe uzadis sen ajna



Óscar de Diego emocie atentus la omaĝon al sia frato

P. BRANCO

komplekso.

Jorge Camacho parolis pri GDEE kiel pri lingva katedralo preskaŭ plene konstruita de unu sola homo, kaj pri la fekunda influo de la sti-

lo de Diego ne nur en ĉiulandaj tradukistoj, sed ĉefe en la originala verkado de la anoj de la iberaj grupo.

Kondolencoj de UEA

Lorenzo Noguero laŭtlegis kondolencan mesaĝon de Renato Corsetti, prezidanto de UEA (vd. paĝon 17), al la familio Diego kaj al la hispanaj esperantistoj. Miguel Ángel Sancho lokis Diegon en la esperanto-panoramo de Hispanujo en la dua duono de la dudekaj jarcento kaj, kiel la antaŭaj parolantoj, instigis la publikon daŭre legi liajn verkojn, antaŭ ol transdoni al la frato Óscar arĝentan memorplaton dankan kaj omaĝan.



Óscar de Diego, ĵus ricevinta la omaĝplaton el manoj de M. A. Sancho

A. ARQUILLOS

La frato esprimas dankosenton

Fine, Óscar mem suriris la podion por esprimi verve kaj simpatie siajn sentojn, emfazante ne nur la aksan rolon de esperanto en la vivo de Fernando sed ankaŭ la ne ĉiam menciatajn apogon kaj helpon konstantajn fare de ĉi ties edzino Czesia.

La parolado de Óscar okazis hispanlingve, kun kelkaj senkulpigaj komencaj vortoj en esperanto. La ceteraj prelegintoj esprimiĝis per esperanto kaj Jorge Camacho, gvidate de sia profesia lerto, aldonis sinsekvajn tradukojn de siaj vortoj en la hispana.

Do, resume: admiro, kondolenco, emocio, larmetoj, kortuŝo, sincera laŭdo kaj fiero en la plej intensa horo de la kongreso.

Omaĝo en oda kleo al Fernando de Diego

*Ido de l' ter', vi donis vin vortnutre
niadezerte. Cent horloĝoj ŝrumpis
sursable, de tineoj forskuite
el siaj seke krakaj lirikebranĉoj.
Kaj sprosis vi kaj ŝprucis kaj oazis,
spitante la samumon
el nia verda mondo ĉiam preta
saturni sian pleje freŝan limjon.*

El la poemaro *El miaj sonoraj soloj*
de Miguel Fernández

Ŝorca kiĥota lingvo

Abel Montagut admiras Fernandon per tiu ĉi mirinda cervanteca dialogo inter Sancho kaj Don Quijote, ĉerpita el sia verko *Karnevale*.

—Ho, jen vi tenas en la manoj, kara sinjoro Don Quijote, mian preferatan tradukon de viaj nesupereblaj hidalgajoj. Ĝi estas en la universala lingvo de la scioplana kaj laŭdire juda magiisto Samenuf (...)

—Mirinde ke sen ia rimarko kaj malhelpo -mi diris- oni interkompreniĝas kun alinacianoj (...) Sed kiu estas la tradukinto de miaj kavaliraĵoj en ĉi tiun sorĉan lingvon. Ĉu la magiisto Samenufo mem, kiun vi menciis?

—Ne li mem, sed li sendis al ni homon el la reala mondo, kvankam el la futuraj tempoj, guadalajarano, kies nomo estas Fernando de Diego. Li vizitis nian kavernon kaj restis inter ni dum cent jaroj da soleco por lerni la sorĉan lingvon kaj fari la tradukon (...)

30a de junio, 2005

Ĉi-someron, domaĝigis la tutan esperantistaron —aparte la hispanan kaj hispanlingvan— la notico pri la morto de Fernando de Diego, okazinta nur dek tagojn antaŭ la eko de la Hispana E-Kongreso kiu pretis omaĝi lin.

LORENZO NOGUERA

Fernando de Diego mortis la 30an de junio en Zaragozo, jam sufiĉe aĝa kaj kun malforta sanstato, des pli pro la morto de sia edzino Czesia en Pollando la pasintan jaron, kio profunde deprimis lin. La samideano Enrique Navarro ofte vizitadis FdD-on dum la lastaj tagoj de lia vivo.



Familianoj kaj samideanoj staras apud la ĉerko de FdD, antaŭ ties kremacio

L. NOGUERA

La novaĵo disvastiĝis vendredon la 1an de julio. La funebraĵoj okazis la 2an de julio en la tombejo *Cementerio de Torrero* en Zaragozo. Ĉeestis kelkaj familianoj kaj grupo da esperantistoj el la



Florkrono kun esperanta devizo
L. NOGUERA

asocio *Frateco*. Lorenzo Nogueira, kiel Prezidanto de la asocio kaj ankaŭ nome de diversaj institucioj (inter ili de UEA kaj HEF), komunikis kondolencojn al la

familianoj; kun Óscar, frato de Fernando, eblis paroli en Esperanto. En florkrono dediĉita al FdD legeblis: *La Esperanto-mondo, kun admiro*. Enrique Navarro fine legis kelkajn emociigajn vortojn esperante kaj hispane. Poste okazis kremacio. La dimanĉon 3an de julio aperis artikoleto en la ĉefa zaragoza ĵurnalo *Heraldo de Aragón* pri la mirinda tradukinto de *Don Quijote* al Esperanto.

Vivprotokolo

La noto, kie UEA disvastigis la noticon pri la morto de Fernando de Diego, enhavis jenan resuman vivprotokolon de li.

Fernando de Diego de la Rosa naskiĝis la 2-an de novembro 1919. En li la Esperanta mondo perdis unu el siaj plej brilaj kaj fekundaj beletristoj. Inter liaj pli ol 20 tradukvolumoj troviĝas i.a. *Cigana romancaro* de Lorca (1971), *La inĝenia hidalgo Don Quijote de la Mancha* de Cervantes (1977), *La familio de Pascual Duarte* de Cela (1985), *Cent jaroj de soleco* de García Márquez (1992) kaj *La oldulo kaj la maro* de Hemingway (1996). Tre valoraj estas liaj studoj *Pri Esperanta tradukarto* (1979) kaj *Pri literatura kritiko* (1984). En 2003 aperis lia granda Esperanta-hispana vortaro. En la UK en Valencio, 1993, Fernando de Diego estis elektita kiel honora membro de UEA.

Kondolencia noto de UEA

En rekorda tempo, UEA disvastigis siajn kondolencojn al familianoj kaj amikoj de Fernando de Diego Jen la teksto, rekte el la plumo de la UEA-Prezidanto, Renato Corsetti.

Karaj familianoj kaj konatoj de Fernando de Diego, karaj esperantistoj. Mi skribas ĉi tiujn malmultajn liniojn por saluti Fernando-n de Diego kun tre peza koro.

Ĉiuj parolantoj de la internacia lingvo Esperanto konas lin. Mi ne devas memorigi pri liaj vivo kaj verkoj. Tiuj verkoj estis unu el la gravaj vivo-manifestiĝoj de Esperanto dum la dua duono de la pasinta jarcento. Plenmerite, do, li estis honora membro de Universala Esperanto-Asocio kaj, ĉefe, ricevis honoran lokon en la koro de ĉiuj esperantistoj, kiuj pere de li konatiĝis kun la hispana kulturo. Li estis, interalie, la plej sukcesa ambasadoro de tiu kulturo en la Esperanta mondo.

La pezo en mia koro nun ŝuldiĝas al io tute persona. Lia traduko de la Cigana Romancaro estis dum jardekoj mia plej granda gvidilo pri

tradukado de poezio. Per ĝi mi lernis kiom grava estas la rekreado de la originalo fare de poeto-tradukisto. Mi daŭre instru-cele citis pecojn de tiu libro al pli junaj esperantistoj kaj plufaros.

Sed mi estas nur unu el la multegaj esperantistoj, kiuj havis personan rilaton al Fernando de Diego tra liaj verkoj. Kiel ni ĉi tie, tiuj multegaj ŝatantoj de liaj verkoj nun kunfunebros kun ni pro lia malapero, kvankam lia spirito certe ankoraŭ longe vivos inter ni kaj inter la postaj generacioj de parolantoj de Esperanto.

Universala Esperanto-Asocio, kiu ĝuis la privilegion havi lin kiel honoran membron, mallevas sian flagon kiel signo de partopreno al la doloro de la tuta komunumo de liaj konantoj kaj admirantoj.

RENATO CORSETTI



Pliaj nekrologaĵoj

Herbert Lionel Elvin (1905-2005), brito, honora patrono de UEA. Li naskiĝis kiam realiĝis la unua UK en Bulonjo. Forpasis la 14an de junio.

Takeuti Yosikazu (1931-2005), japano, honora membro de UEA. Forpasis la 29an de aŭgusto.

Franko Luin (1941-2005), svedo, kreinto de pluraj sukcesaj retservoj: retejoj de sveda asocio, e-librejo, kiosko. Forpasis la 15an de septembro.

La oldulo kaj l' amaro

Eksciinte pri la morto de Fernando de Diego, la portugalo Gonçalo Neves —intelekta ido lia kaj ano de la Ibera Skolo— tuj verkis jenajn ideojn, kiujn li mem kromtitoligis *fasketo da pensoj ĉirkaŭ la morto de Fernando de Diego*. Ĝi unue aperis en revuo *Fonto*.



Fernando de Diego de la Rosa, fekunda tradukisto, recenzisto, kritikisto, eseisto kaj publicisto, klera homo, polemika figuro, adorata de iuj, anatema de aliaj, enviata de pluraj kaj ignorata de multaj – mortis. Li planis “atendi la alvenon de la aĝa frato de la Songô” en Wrocław, sed la granda Falĉisto preferis lin viziti hejmlande, kien li revenis amare kaj solece post la forpaso de Czesia, la pola edzino. Li oldis 85 jarojn, sed lia menso lucidis ĝis la fina rajpo de la motoro korpa.

Malfacilas objektivigi pri homoj, eĉ se kadavraĵoj, skeletaj aŭ jam polvaj. Eĉ pli dorna la tasko kiam oni la juĝaton konis persone. Nun mi ĝojas ke Fernandon mi

neniam renkontis, ke lian voĉon mi neniam aŭdis, ke neniu leteron aŭ bileton mi interŝanĝis kun li. Eble tial mi nun kapablos iom proksimetri al dezirata subjektivo.

Lin mi lernis rendevui sine de streĉa silento, kiun interrompis nur la paĝa susuro de mia leg-avido. Frazon post frazo, vorton post vorto, mi poiome mergiĝis en fabelan mondon, kies solaj loĝantoj estis puraj tintoj kaj ŝvebaj pe-

Nun mi ĝojas ke Fernandon mi neniam renkontis, ke lian voĉon mi neniam aŭdis, ke neniu leteron aŭ bileton mi interŝanĝis kun li. Eble tial mi nun kapablos iom proksimetri al dezirata subjektivo.

poj. Tiun mondon eblas nomi stilo. Jes, antaŭ kaj super ĉio Diego rangis kiel stilisto. Lian oreton agacis ne nur ĉio kako-fonia, sed ankaŭ ĉio gurma, teda, monotona kaj plata. Por dishaki sintaksajn veprojn li tratalpis nian klasikan grundon kaj esploris ties plej profunde kaŝitajn ercojn. Ekzemple, dum aliaj proponis kaj ekzuzis ekstravagancajn rimedojn por dampi la grincon de nia fifama paro *tiuĵ kiuĵ* (ĉi-strebe Lanti lanĉis —sed poste repudiis— la formon *ti-kiuĵ*), Diego preferis resti cise kaj ĉerpi el la interna bunto de la lingvo. Tion ekzemplu jena eltiraĵo el Donkiĥoto (ĉap. XIII, p. 95):

La rigardantoj, la fosantoj de la tomo kaj la ceteraj homoj gardis impresan silenton, ĝis unu el la kadavro-portintoj diris al la alia [...]

Oni rajtas objeti ke ĉi-terene liaj solvoj ŝajnas kolumbo-ovaj, ke iu ajn meztalenta kapablos ilin elpensi kaj senĝene apliki. Prava objeto. Tamen endas riposte demandi: kial tiajn ovojn ne starigas pli da Kolumboj, kial post pli ol cent jaroj nia prozo ankoraŭ tren-paŝas ĉe multaj aŭtoroj, kial ankoraŭ knaras tiom da plumoj, eĉ renomaj? Ĉiaokaze, ĉi faceton de Diego oni ordinare ignoras aŭ prisilentas.

Kiam temis pri tratanĉo de gordiaj vortoj leksikaj, Diego plukis el pluraj arboj. Li ne nur insiste kaj persiste uzis vortojn neofte renkontatajn en la demotika esperanto, abunde ĉerpante el Kalocsay, Waringhien kaj aliaj korifeoj, sed eĉ lanĉis kelkajn novaĵojn el sia propra ateliero. Ekzemple, en liaj lastaj tradukoj aperas *mokra*, tre bela kaj elvokiva vorto, samsignifa kiel la demotika *malseka*. Tiun vorton, el la pola *mokry* kaj identa kun la rusa *mokrij*, inspiris al li la edzino. Ĉi faceton de Diego oni supraĵe komentas en kulisoj kaj laŭte distrumpetas en agoroj. El tia pritrakto rezultas la famo de Diego kiel neologo, dum lia enverguro kiel stilisto iel postrestas duarangeg.

Oni emas preterrigardi ankaŭ aliajn faktojn pri Diego. Ĉu niaj oficialaj kaj duonoficialaj opiniistoj scias ke Diego produktis la impresan kvanton da 3560 tradukpaĝoj? Ĉu ili konscias ke tiu paĝ-amaso rezultis el laboro intensa, streĉa, rigora, esplora? Ke li ĉion trameditis, reviziis, kribris, poluris kaj emajlis ĝis la lasta imagebla detalo? Ke li komparis siajn tekstojn kun alilingvaj tradukoj? Ĉu tiaj opiniistoj scias ke li estis ankaŭ senlaca leganto kaj vastpaletra analizanto de nia literaturo? Ke li recenzis ne malpli ol 217 verkojn?

Diego ja konis ĉiujn fibrojn kaj neŭronojn de esperanto. Nenio ĉe li rezultas el kaprico, frivolo aŭ hazardo. Evidente li ne ĉiam trafis. Tamen liaj solvoj neniam ŝajnas ekstravagancaj, idiolektaj aŭ ŝibolektaj. El ĉio liapluma emanis seriozo, kompetento kaj talento, eĉ se oni ne konsentas pri tiu aŭ alia vorto, pri tiu aŭ alia tropo.

La oldulo sinkis amare. La skipa reviziado de lia giganta vortaro hispana-esperanta (1279-paĝa) treniĝis dum jaregoj kaj kaŭzis al li ne pokan angoron. Kiam fine ĝi eldoniĝis en 2003, li jam komencis sobgliti la viv-taluson kaj ŝajne ne sukcesis ricevi sufiĉe da aŭtorrekzempleroj. Sed lian amaron nutris ankaŭ la maljusta bildo kiu restis post iom da kuraĝaj elpaŝoj liaflankaj, nome kiam li aŭdacis publike kritiki mistalentajn verkojn de Auld, Piron kaj aliaj popularaj figuroj de la verda panteono. Kiam oni tanĝas guruon, oni riskas batuon. Plurspecaj katapultoj priĵetis Fernandon dum lia longa kariero kiel esperanta tradukisto. Eĉ ŝovinisman riproĉon de Ungar li devis elteni, kiam li, hispano, aŭdacis esperantigi verkon de angla aŭtoro!

Diego, profunda konanto de nia lingvo kaj literaturo, ŝajne ne tiom detale familiariĝis kun nia historio. Eble tial li ne memoris ke Cart, nia unua demotika demagogo, publike skurĝis Zamenhof pro ekuzo de *heziti* anstataŭ *ŝanceliĝi*, dum li mem en siaj artikoloj uzis vortojn kiel *skvaro*... Ke la metodon de Cart imitis multaj, avidaj rapide populariĝi kaj gvidi amasojn. Ke ĝin imitas eĉ hodiaŭ pluraj podiuloj de nia verda mondeto. La recepto estas facila. Sufiĉas pilorii neologojn por akiri pli da voĉoj kaj sorigi sian kvoton de populareco. Ankaŭ Akademien tio helpas... Dum pluraj jaroj Diego disponeblis kiel taŭga furaĝo por tiaj soruloj. Nun lia korpo kadavras. Kiel elektebla celtabulo ankoraŭ restas Haupenthal. Ankoraŭ eblas sterki la fantasmojn de la reformemo, kies kontraŭbatalo pravigas la promocion de ĉiaspecaj nuloj...

Ĉu niaj oficialaj kaj duonoficialaj opiniistoj scias ke Diego produktis la impresan kvanton da 3560 tradukpaĝoj?

Por aliaj, espereble ĉiam pli multaj, restas la verkaro de Fernando de Diego. En ĝi la zamenhofa lingvo vigle pulsas kaj delekte scintilas. Eble iam oni povos starigi veran tradukistan lernejon, kie oni studos kaj analizos la solvojn de Diego kaj aliaj eminentaj aŭtoroj. Eble tiam la proporcio de lerte kaj bele tradukitaj verkoj komencos pli rapide kreski kaj eĉ superos tiun de tekstoj plataj kaj sensalaj, eĉ se gramatike korektaj. Eble tiam esperanto imponos kaj impresos: ne kiel “tutmonda dua lingvo” – tia ŝanĉo egallas nulon – sed almenaŭ kiel prestiĝa kaj respektata idiomo literatura, kiun multaj kulturhomoj scipovos, eĉ se nur pasive, por koniĝi kun la bonaj verkoj tradukitaj en ĝi kaj kun la bonaj originaloj karambo-

le rezultintaj el tia tradukstrebado.

Ĉiaokaze la verkaro de la oldulo ekspluateblas jam nun. 3560 paĝoj da klara kaj elasta stilo sin proponas kiel fonto de plezuro kaj lerno. En la nuna jaro, kiam oni festas la 400-jaran datrevenon de Donkiĥoto, oni komencu ekzemple per tiu 820-paĝa verkego. Oni ne nur paradu per ĝi en publikaj ceremonioj por impresi skabenojn kaj ĵurnalistojn. Oni ja apertu la pezan volumon en la silento de sia alkovo kaj legu el ĝi, en verva esperanto, la instruajn aventurojn de la plej fama vaganta kavaliro. Kaj legante oni lernu verki pli bone kaj paroli pli bone. La belo bele. Dankon, Fernando.

GONÇALO NEVES

Vortoj de Fernando

Sekvas kelkaj pripensoj de Fernando de Diego, pri ties preparo por la traduko de *Don Quijote*. Ĉerpitaj el la artikolo *Genezo kaj tradukproblemoj de la Esperanta Don Quijote*, aperinta en la kompilaĵo *Serta Gratulatoria in Honorem Juan Régulo. Esperantismo. Vol. II*. Universidad de la Laguna, 1987.

...Tiel komenciĝis la absorba aventuro, kiu plenis tri/kvar jarojn de mia vivo. Mi armis min per tradukoj naciaj de *Don Quijote*, inter ili la angla de J. M. Cohen kaj la franca de Francis de Miomandre; per diversaj eldonoj de *Don Quijote* en la hispana; per vortaroj hispanaj, francaj, italiaj, germanaj; per frazeologiaj vortaroj, per la *Plena Ilustrita*, per la *Plena Gramatiko*, per la *Parnasa Gvidlibro*, per ĉiaj verkoj konsultaj kaj referencaj...

Mi iris en la labirinton de kvar-lingva komparado kun ĉiu linio de *Don Quijote*, kontrolis la signifon kaj la allaseblan senco-vastigon de ĉiu Esperanta vorto uzata, klopodis ne perdi la fraz-ritmon kaj la tonon de la originalo, skrupule kal-

kulis la konvenon uzi neologismon kaj ĝian eventualan formon... Temis pri speco de Sizifa laboro: tro multe da klavoj por ilin samtempe frapi per nur dek fingroj. Ofte mi laboris dek tri aŭ dek kvar horojn sinsekve, kun nur paŭzeto por rapide manĝi. Kaj, kiam mi enlitiĝis, ankorau min hantis la problemo de enigma frazo en la originalo, aŭ la maniero traduki ŝajne netradukeblan parol-turnon.

Al laboro traduka sumiĝis la legado de dekoj da libroj rilataj al Cervantes kaj ties epoko, kaj dank' al ili mi povis kompreni kaj decifri, interalie, kelkajn trajtojn el la ironio de Cervantes, ironio subtilege morda kaj penetra kiel aroma pocio venena...



Plua subvenciado de- pendas de vi

Direktoro de *Fundación Esperanto*, atentigas nin pri la nepro plenumi la kondiĉojn al kiuj ni submetiĝis akceptante publikan subvencion. Via helpo estas necesega por sukcesi. Bonvolu kunlabori! ankoraŭ restas tempo.

TOÑO DEL BARRIO

Pasinta numero de Boletín informis pri tio ke la Ministerio de Kulturo havigos al HEF subvencion de 3.000 eŭroj por la projekto Donkiĥoto parolas Esperanton, kiu kunligas la agadojn de la hispana Esperanto-movado ĉirkaŭ la kunmemoro de la datreveno de la publikigo de la verko La ingenia hidalgo Don Quijote de la Mancha. Ni jam povas konfirmi vin ke la burokrataj muelejoj estis jam venkitaj en tiu unua batalo, kaj ke la Ĝenerala Oficejo pri Kultura Kunlaboro konfirmis la subvencion, per rezolucio aperinta en BOE de la 27-a de julio.

Sed nun ni havas alian bonan novaĵon por vi: alia fako de la sama Ministerio, tiu pri Libroj kaj Bibliotekoj, ankaŭ trovis subvenciinda nian projekton, kaj helpo al ni per eĉ pli granda kvanto, nome 6.000 eŭroj. La tuta helpo do sumas unu milionon kaj duonon da antikvaj pesetoj.

La agadoj je kiuj ni povas elspezi la

monon donacitan inkluzivas grandan parton de la agadoj ĉirkaŭ la projekto. Inter ili menciindas la konkurso de infanaj desegnoj, la partopreno en Expolingua, la kongreso de Alcalá de Henares, la ellaboro de dokumentoj pri la tradukoj al Esperanto de la verko de Cervantes, aŭ la donaco al diversaj ekzempleroj de la esperanta traduko al publikaj institucioj kun rilato al la aŭtoro kaj la verko.

Ĝuste pri tiu ĉi lasta agado ni bezonas la kunlaboron de la diversaj esperantaj grupoj, kaj de la unuopaj aktivuloj. Inter la agadoj planitaj troviĝas la disvastigo de nia lingvo, de la literaturo kaj specife de la traduko de Donkiĥoto, pere de la organizado de diversaj agadoj en la urboj kie troviĝas esperantistoj, aŭ kie tiuj ĉi povas agadi. Jen kion ni proponas: profiti de la donacado de nia traduko al diversaj bibliotekoj, muzeoj aŭ aliaj ins-

Jen kion ni proponas: profiti de la donacado de nia traduko al diversaj bibliotekoj, muzeoj aŭ aliaj institucioj, por organizi kampanjon de informado pri la lingvo

tutucioj, por organizi kampanjon de informado pri la lingvo, pere de prelegoj, sendo de raporto al komunikiloj, ekspozicioj aŭ similaj elmontroj. La ekzemplerojn de la libro povas liveri (tute senpage por tiu ĉi celo) *Fundación Esperanto*, kiu apro-

bis sian partoprenon en la projekto. Alia materialo, kiel informaj dokumentoj, broŝuroj, elektronikaj prezentoj, estas je ĉies dispono. Sed **la homfortojn devas provizi la lokaj asocioj mem**, kaj tial la organiza skipo de la projekto kaj la estraro de la Federacio deziras fari alvokon por ke ni ĉiuj profiti de tiu ĉi eksterordinara cirkonstanco por montri la vivantecon de la lingvo kaj la movado en plej diversaj urboj de la duoninsulo.

Aliflanke, ni deziras klarigi ke la subvencio ne celas la ĝeneralajn ĉiutagajn agadojn de la Federacio, kaj estas bone substreki ke tio ĉi ne nepre fortigas la financan situacion de la asocio, ĉar ankaŭ la elspezoj pligrandiĝos, pro kio oni ne devas neglekti tiun ĉi flankon. Eĉ pli, en la dokumentoj prezentitaj al la Ministerio estis intaŭvidite ke ekzistos specialaj kontribuoj de la esperantistoj kaj simpatiantoj por tiu ĉi projekto. Tial, ni kuraĝas peti de la esperantistoj la monan kunlaboron en tiu ĉi agado. Si vi konsideras ĝin helpinda, vi povas enkasigi la kontribuon en la kontojn de la Federacio aŭ de la Fondaĵo, kun la indiko ke temas

pri la "Projekto Quijote".

Ĉiukaze, la plej granda helpo ne estos la financa, sed la kunlabora. Se vi deziras partopreni la agadojn, kaj profiti tiun ĉi unikan ŝancon, kontaktu la organizantojn, kaj ni certe trovos la manieron fruktigi la konfidon montritan en la projekto, ne nur flanke de la movadanoj sed ankaŭ fare de la oficialaj institucioj mem.

Kontaktu Fundación Esperanto
kaj petu materialon por via loka
"kiŭhota" agado en:
fundacion@esperanto-es.net

Universitata agado

Esperanto kaj la Monda Jaro de Fiziko

MANUEL PANCORBO

La *Hispana Reĝa Societo pri Fiziko* (RSEF) zorgas pri tiu ĉi jubilea jaro de fiziko, kaj tiucele kolektas ĉiujn agadojn en siaj retpaĝo. La prelego *La revolucio de Einstein en Fiziko*, fare de Manuel Pancorbo, kadre de la pasinta 64a HEF-kongreso, meritis aperigon en tiuj paĝoj. Ankaŭ HEF estis enlistigita kiel kunlabora asocio.



Por plua informado:

www.fisica2005.org

www.fisicaysociedad.es

Ambaŭokaze, metu la vorton "esperanto" en la respektivan serĉilon.

Pluas esperanto kurso en AUB

JOSÉ MARÍA GALOFRÉ

Kultura Asocio Esperantista, KAE, organizas por sesa fojo en Katalanujo, kunlabore kun Aŭtonoma Universitato de Barcelono, oficialan esperanto-kurson, kiu provizas du liber-elektajn kreditojn. De la 11a de oktobro ĝis la 1a de decembro.



Prezento de poemaroj en madrida Ateneo

P. AGURO

Vendredon, la 10an de junio, okazis en Ateneo de Madrid hispanlingva prezento de la poemaroj *Saturno* kaj *Celakantoj* de Jorge Camacho. Krom la aŭtoro kaj la esperanto-poeto Miguel Fernández, kunprezentis ankaŭ la hispana verkistino Nuria Barrios, kiu alportis apartan vidpunkton de leganto ne parolanta esperanton; ŝi estas aŭtoro de la romano *Amores patológicos* (Morbaj amoj) kaj de la poemaro *El hilo de agua* (La strio de akvo) Kiel publiko ĉeestis tri-deko da personoj, inter ili la kanada verkisto Higinio García.



Nuria Barrios (dekstre) demandas al prezentanto, Jorge Camacho (centre), atentate de Miguel Fernández (live)

M. PANCORBO

Kiel dirite, la evento disvolviĝis hispanlingve, ĉar la prezento altiris la atenton de nemovadanaj scivoluloj. Jen la atuto de tiaj ateneaj aktivadoj.

Post la sprita kaj verva prezento, kun legado de poemoj de ambaŭ libroj, la ĉeestantoj demandis al la aŭtoro pri plurfankaj trajtoj de liaj esperanta- kaj verkem- alvokiĝoj; Jorge respondis afable, ridete kaj sincere eĉ al tiklaj demandoj, kia sia supozita kabeo. La kunprezentanto, Nuria Barrios, miris pri la kapablo de

esperanto kiel komunika kaj literatura lingvo kaj lanĉis priajn demandojn al Jorge.


Fine, pluraj homoj aliris la verkiston por aĉeti de li ekzemplerojn de la libroj, peti subskribon aŭ gratuli lin. La evento rondperfekte finiĝis en la trinkejo de proksima "Casa de Guadalajara".



Javier Moleón bierumas kun Jorge en "Casa de Guadalajara"

M. PANCORBO

Tre atendata libro



Ĵus eldoniĝis la libro, tre varme atendata, *El hombre que desafió Babel*, traduko de la fama franclingva verko de Masson/Centassi, pri la vivo de Zamenhof.

Ĝin eldonis Madrida Esperanto Liceo, MEL, kaj tradukis kelkaj el ties membroj. Konsultu malantaŭ-kovrilon por plia informo pri ĝia aĉetado.

Renkonte en Esperantujo

90a Universala Kongreso en Vilno

De la 23-a ĝis la 30-a de julio 2005 kunvenis la ĝis nun plej granda internacia renkonto okazinta en la litova ĉefurbo Vilno: la 90-a Universala Kongreso de Esperanto (UK) kun pli ol 2300 homoj el 62 landoj.

La Kongreso okazis cent jarojn post la Unua Universala Kongreso de Esperanto en Bulonjo-ĉe-Marco (1905), kiu markis la eniron de Esperanto en la epokon de parola uzo. La Vilna Kongreso donis tial okazon pensi sub la titolo *Universalaj Kongresoj: 100 jaroj de interkultura komunikado* pri la tuta sinsekvo de Universalaj Kongresoj.



Kongresejo Siemmens Arena en Vilno

FONTO: GXANGALO.COM

Kleriga valoro

Tra jardekoj, kiujn karakterizis sociaj ŝanĝoj, politikaj perturboj kaj du teruraj militoj, la Kongresoj konservis sian plej elstaran trajton tiun de forumo por la renkonto de "homoj kun homoj" (kiel formulis Lazaro Zamenhof, la kreinto de Esperanto, en Bulonjo) kun firma volo superi la barojn de nacieco kaj ideologio. Pluraj sesioj de la Vilna UK estis dediĉitaj al la utilo, kiun la Kongresoj

alportas al la partoprenantoj. Multaj emfazis la klerigan valoron de UK ne nur por vastigi sian scion en diversaj fakoj, sed ankaŭ por konsciigi pri la efikoj de interkultura komunikado je plej persona nivelo.

Baze de zamenhofa tradicio

Zamenhof en sia parolado en 1905 celis krei senton de solidareco kaj la konvinkon, ke helpo de Esperanto eblas plibonigi la kunvivadojn de homoj en la mondo. Sur tiu tradicio plue apogas sin la UK-oj, kiuj demonstras la daŭran aktualecon de la klopodo faciligi la homaran kunvivadojn per la poiojma laboro de individuoj kaj pruvas la gravecon de bona volo en la interproksimigo de homoj.

Jubileo en lulregiono de Esperanto

La Vilna UK, kiu okazis en la naskiĝregiono de Esperanto, je vojkruciĝo de kulturoj, denove montris, kiom sukcesa estas la unusemajna kunestado de homoj unuigitaj per la lingvo Esperanto kaj komune praktikantaj komunikadon sen antaŭjugo kaj limigoj. La kongresanoj de Vilno firme fidis, ke la centjara historio de Universalaj Kongresoj kiel sukcesa ekzemplo de interkultura komunikado estos daŭrigata, kaj tial alvokas al homoj de simila bona volo lerni Esperanton kaj sperti similan travivaĵon, kiun ĵus donis la Kongreso de Vilno.

UEA

Decidoj de komitato de UEA

Dum siaj kunsidoj, la komitato de UEA prenis plurajn decidojn rilate al akceptoj de novaj landaj kaj faktaj asocioj, kaj al novaj honoraj membroj.

LIBERA FOLIO - WWW.LIBERAFOLIO.ORG

Akcepto de landaj asocioj

La komitato de UEA, en sia dua kaj lasta kunsido en Vilno, akceptis aliĝon de Esperanto-Federacio de Niĝerio kaj Irana Esperanto-Asocio. La Irana asocio tamen devas doni ĝis la fino de aŭgusto skriban konfirmon ke ĝi respektas statuson de UEA, estas neutrala kaj ke ĝi estas vaste malfermita al la civitanoj de sia lando.

En la ĝenerala diskuto pluraj komitatanoj rakontis pri bona kunlaboro kun iranoj kaj opiniis la aliĝon de Irana Esperanto-Asocio bonvena. Kelkaj preferis prokrasti la aliĝon ĝis la venonta kongreso, sed la plimulto volis trakti la aferon jam nun.

Peto de fakaj asocioj

La aliĝpetoj de fakaj asocioj kaŭzis al la koncerna komisiono eĉ pli da problemoj. La nuntempa kunlaboranta faka asocio *Esperanto-Populariga Asocio de Oomoto* petis ke la komitato ŝanĝu ĝian statuson kaj akceptu ĝin kiel aliĝintan fakan asocion. Samtempe alia frakcio de Oomoto, *Universala Hom-Ama Asocio*, petis kunlaboran kontrakton kun UEA.

Laŭ Brian Moon, kiu voĉlegis la raporton de komisiono pri statuto de landaj kaj fakaj asocioj, kiel religia organizaĵo la Esperanto-Populariga Asocio ligita al

UK cifere

Entute aliĝis 2.344 homoj kaj tiel vilna UK iĝis la plej granda post la 84-a Universala Kongreso en Berlino 1999.

Memore al De Diego

Fernando de Diego estis omaĝita en la UK per salono kun sia nomo, kaj per minuto da silento dum la ferma ceremonio.

Oomoto ne estas neŭtrala kaj ne rajtas aliĝi al UEA. Se ĝi estus, laŭ sia nomo, nur asocio por popularigi esperanton, ĝi aliflanke tamen ne povus aliĝi kiel faka asocio, ĉar popularigo de Esperanto ne estas aparta fako, kiel tiu termino estas komprenata ĉe UEA.

Male, *Universala Hom-Ama Asocio* ja principe taŭgas kiel kunlaboranta faka asocio, sed restis la problemo, ĉu vere necesas ke UEA havu du Oomoto-rilatajn kunlaborantajn asociojn. La komitato decidis prokrasti la decidon pri ambaŭ aliĝoj.

Novaj honoraj membroj

La komitato akceptis ĉiujn ok novajn honorajn membrojn, kiujn proponis la estraro de UEA: **Roman Dobrzyński** (pola filmisto), **Ursula Grattapaglia** (konata pro la infanejo Bona Espero en Brazilo), **Heta Kesälä** (multjara aktivulo en Finnlando), **Boris Kolker** (rusia kaj poste usona aktivulo, verkinto de *Vojaĝo en Esperanto-lando*), **Telesforas Lukoševičius** (litova instruisto, verkinto de lernolibroj), **Duilio Magnani** (itala pastro kaj aktivulo de la katolika Esperanto-movado), **Stevens Norvell** (kanada aktivulo, kolektinto kaj prizorganto

de la plej granda Esperanto-biblioteko en Nord-Ameriko) kaj **Andrzej Pettyn**, konata pola radi-ĵurnalisto. La supozita firolo de la du novaj polaj honoraj membroj en la okazaĵoj de 1985 —pro la interveno de la tiama diktatora reĝimo en la nacia pola asocio— ne kaŭzis diskutojn en la komitato, kaj ankaŭ la aliaj honoraj membroj estis akceptitaj senproteste. Tamen ne estas konate, kiom da voĉoj la diversaj kandidatoj por honora membreco ricevis ĉar tiuj ciferoj tradicie ne estas diskonigataj.

Ĉu nova Unesko-rezolucio?

Dum la UK estis sciata, ke la litova ambasadoro ĉe Unesko prezentos novan rezolucion favoran al Esperanto dum la ĝenerala asembleo de tiu organizo en oktobro. La kroata reprezentanto jam anoncis ke li subtenos la proponon, kaj same faros la reprezentantoj de Nederlando, de Ĉinio, kaj de la nord-europaj landoj.

Kunsido de amerika komisiono



AUGUSTO CASQUERO

Dum la 90a UK okazis interalie kunveno de reprezentantoj de diversaj landoj de Hispanio, Portugalio, Argentino, Usono, Meksikio, Kubo, Ĉilio, Brazilo, ktp, sub la gvido de Atilio Orellana Rojas (Argentino) prezidanto de la Amerika Komisiono de UEA kaj Maritza Gutiérrez (Kubo) estrarano de UEA pri Landa Agado.

Oni decidis plifortigi kaj plioftigi la kontaktojn kaj kunlaboron inter la amerikaj landoj kaj Hispanio kaj Portugalio.

Oni kreos specialan komisionon por pli efike labori en tiu kampo.

Simpozio Nitobe

Sepdeko da konataj sciencistoj, politikistoj kaj reprezentantoj de la Esperantomovado tuj post la Vilna kongreso partoprenis la 4-an Nitobe-simpozion en la litovia parlamentejo por diskuti eŭropan lingvan politikon.

LIBERA FOLIO - WWW.LIBERAFOLIO.ORG

En nekutime prestiĝa ĉirkaŭaĵo, en la litovia parlamentejo, okazis la kvara Nitobe-simpozio. La simpozio, organizita tuj post la Universala Kongreso de Esperanto en Vilno, kolektis aron da mond-renomaj sciencistoj kaj politikistoj por diskuti la lingvopolitikajn aspektojn de la disvastiĝo de la Eŭropa Unio.

La Nitobe-simpozio estis aranĝita en la parlamentejo, ĉar unu el la kunorganizantoj de la simpozio estis la litova parlamen-

ta komitato pri Eŭropaj aferoj. Tial la parlamento senpage disponigis salonon kaj aliajn ejojn kaj provizis aliajn valorajn servojn. Krome la prezidanto de parlamenta komitato invitis por solena vespermanĝo la plej gravajn partoprenantojn de la simpozio. La aliaj kunorganizantoj de la simpozio estis Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-problemo (CED), la Universitato de Vilno kaj la Litovia Akademio de sciencoj.

La Nitobe-Simpozioj portas la nomon de Nitobe Inazô (1862-1933), asista ĝenerala sekretario de la Ligo de Nacioj, kiu vizitis Universalan Kongreson de Esperanto kaj raportis pri siaj pozitivaj spertoj. Nitobe-Simpozio jam okazis en Prago (1996), Berlino (1999) kaj Pekino (2004).

En la fina dokumento de la ĉi-jara simpozio la partoprenantoj planis alvoki Eŭropan Union konsideri uzon de Esperanto. *Necesas paroli pri alternativaj vizioj por la lingva estonto de Eŭropa Unio, inkluzive de la konceptoj de lingva egaleco kaj kvalita komunikado. Indas diskuti pri la ebla rolo de Esperanto*, la litovia novaĝ-agentejo ELTA citas la proponitan rezolucion de la simpozio. La definitiva teksto de la dokumento ankoraŭ ne estis publikigita, kaj ŝajne aperos nur, kiam ĉiuj partoprenintoj estos aprobin-taj ĝin.



Inter la partoprenintoj de la 4-a Nitobe-simpozio estis parlamentanoj el pluraj novaj landoj de la Eŭropa Unio, speciale invititaj de la litova parlamenta komitato pri Eŭropaj aferoj. Partoprenis la seminarion ankaŭ la konata sciencisto **Robert Phillipsson**, kies ampleksa verko *Ĉu nur-angla Eŭropo* pasintjare aperis en esperanta traduko.

La Nitobe-simpozioj estas unikaj, ĉar en ili neesperantistaj fakuloj pri lingva politiko renkontiĝas kun pintaj reprezentantoj de la Esperanto-movado en aranĝo organizata kunlabore kun nemovadaj institucioj.

Estis diversmaniere tre vigla konfereenco, kaj ĝi efektive kree aliris plurajn el la centraj punktoj de la eŭropa lingva politiko, kvankam evidente ekzistas malsamaj opinioj pri tio, kiuj estas la problemoj, eĉ ne menciante la eventualajn solvojn. Ankaŭ ĉeestis sufiĉe da homoj kun diversspecaj spertoj, tiel ke la diskutoj estis riĉigaj. Bedaŭrinde ne estis sufiĉe da politikistoj, sed ne eblas atendi tion meze de la somero, diris S-ro Phillipson.

La novaĝ-agentejo ELTA en vaste publikigita artikolo citas **Ivo Samson**, konatan slovakon esploriston pri internacia politiko, kiu partoprenis la Nitobe-simpozion. Laŭ li, la Eŭropa Unio bezonus komunan lingvon, sed ne eblas elekti por tiu rolo iun el la nunaj lingvoj de EU, ĉar tio endanĝerigus la lingvan egalecon.

Laŭ la sama artikolo, titolita *Lingvistoj proponas uzon de Esperanto en institucioj de EU*, la partoprenantoj de la Nitobe-simpozio komune konstatis, ke la Eŭropa Unio, kiu lastatempe kreskis de 15 al 25 landoj, ĝis nun ne povis solvi la politike senteman lingvoproblemon.

Respondo de deputito

Informite pri la simpozio, hispana deputito **Inés Ayala** afable reagis jene:

Les escribo por indicación de Inés Ayala para agradecerles su invitación a participar en las discusiones que tendrán lugar en Vilnius (...) Lamentablemente, la Sra. Ayala no podrá participar en este evento debido a compromisos adquiridos con anterioridad para esa misma fecha.

IJK en Zakopane



La 61a Internacia Junulara Kongreso okazis en Zakopane, Pollando, de la 31a de julio ĝis la 8a de aŭgusto. Legu prie en venontaj artikoloj.

Hispana movadano en IJK

Santiago Sanz, juna kataluno, partoprenis ĉi-jaran IJK-on kaj raportas siajn impresojn por ni.

SANTIAGO SANZ

Nur pasis preskaŭ du monatoj kaj mi jam pensas pri la venonta IJK en Sarajevo! Mi treege ĝuis en la lasta Internacia Junulara Kongreso okazinta ĉi jare en Zakopane (Pollando). Fakte estis mia unua internacia renkontiĝo. Tiujn, kiuj neniam partoprenis junularajn internaciajn kongresojn, mi instigegas partopreni. Estas vere neforgesebla sperto!

Tie mi ekkonis novajn amikojn el multaj landoj (Germanio, Nepalo, Koreio, Rusio, Brazilo, ktp) kaj renkontiĝis kun multaj aliaj jam konataj. Mi ja ne havis tempon por tediĝi: diverspecaj kaj intereseĝaj ekskursoj, prelegoj, kursoj kaj atelieroj amuzis min dum la tago, kaj nokte mi ne ĉesis danci (en la dancejo kaj dum la koncertoj) kaj babili ĝis malfrue matene, se ne paroli pri la spektado de fil-

moj! “Feliĉe” la kongreso nur daŭris unu semajnon. Mi diras “feliĉe” ĉar mi ĉiutage ellitiĝis je la oka kaj duono matene... sed mi enlitiĝis inter la kvara kaj kvina matene! Kompreneble la lastan tagon mi ne plu eltenis min. Sed kiel diras hispana proverbo: “volonta favo ne jukas”, ĉu?

Nu, revenante al la temo de la diurna programo estis vere interesaj kursoj (ekzemple tiu pri E-instruado organizita de ILEI aŭ tiu alia pri la pola lingvo), mul-

Honora patrono de la IJK estis Aleksander Kwaśniewski, la prezidento de Pollando, kaj lian saluton oni legis en la solena inaŭguro. Estis 575 aliĝintoj al la kongreso (26 hispanoj), kaj pli ol cento el ili helpis pri la programo de la kongreso. Inter la prelegantoj estis la esperantista EU-parlamentano Małgorzata Handzlik kaj la konata japana mecenato de Esperanto Etsuo Miyoshi.

LIBERA FOLIO: WWW.LIBERAFOLIO.ORG

taj prelegoj (pri lingvoj en Afriko, sektoj, Siberio), atelieroj (subtekstigado de filmoj, gospel-kanto, art-bataloj, meditado) kunsidoj de diversaj asocioj (landaj kaj internaciaj), ekskursoj (al la Tatra Nacia Parko, al Krakovo, al Auschwitz), koncertoj (Jomo, Esperanto Desperado, Krio de morto) kaj ankaŭ okazis, dum la ĵauda vespero, kultur-lingvan festivalon kiu permesis ekkoni la veran lingvan diversecon de nia kara mondo. Kompreneble mi ne povas paroli ĉi tie pri ĉiuj programeroj, sed mi povas certigi vin, ke la programo estis abunda (ĉiutage estis samtempaj programeroj), tre diversa, interesa kaj sukoplana. Kaj kion diri pri la libroservo?! Vere danĝera... ha, ha, ha! Sed tio, kion mi certe neniam forgesos estas tiuj homoj kiuj faras tiel agrablaj tiajn renkontiĝojn. Eĉ la ĉiutaga pluvo ne malmeritis la kongreson!



Internaciaj dancoj en IJK

S. SANZ

Nur la stranga manĝ-horaro ŝoketis min: kiel diable poloj povas vespermanĝi je la sesa vespere? Nu, ŝercojn for, mi ja neniam forgesos tiun kongreson kaj mi kore rekomedas ilin al ĉiuj. Nepre partoprenu la venontan IJK-on!!!

Preskaŭ mison pro misoj

La LKK de la ĉi-jara Internacia Junulara Kongreso en Zakopane decidis revivigi malnovan tradicion kaj okazigi belec-konkurson sub la titolo "Miss Esperantio".

LIBERA FOLIO - WWW.LIBERAFOLIO.ORG

Lastfoje tia konkurso okazis en IJK en Debrecen, Hungario, en 1983. Jam printempe respondeculoj de UEA klopodis konvinki la organizantojn rezigni pri la ideo, sed vane. Tamen, ja efikis protestoj de kongresanoj en Zakopane. Ankaŭ la bando Esperanto Desperado protestis kontraŭ la planita konkurso dum sia koncerto en Zakopane.

Eble surprize por la organizantoj, ne nur reprezentantoj de la plenkreskula movado, sed ankaŭ tre multaj partoprenantoj de la IJK opiniis la ideon de belec-konkurso neaprobinda. Estis laŭtaj protestoj, kaj fine la jam anoncita konkurso estis nuligita.

Jen vortoj de Kim Henriksen de *Esperanto Desperado*:

Mi parolis kurte kun Vera de la LKK, laŭ ŝi oni rezignis pri la konkurso pro tro da protestoj de okcidentuloj... Cetere mi mem dum nia koncerto de Esperanto Desperado parolis kontraŭ la konkurso. Kiam ni kantis Aline ni ja en la fino kantas ke ĉiuj estas belaj.

Tiaj konkursoj, pro tio ke ili fondiĝas sur patriarkiaj stereotipoj, malaltigas la rolon de virino, eliminigas ŝian dignon, kaj degenerigas kaj la partoprenantojn kaj la spektantojn.

Feliĉe, ke la konkurso ne realiĝis.

Pinta renkontiĝo de esperantista deputito kun EU-Komisionano

Unuafoje en la historio de la Eŭropa Unio, esperantista EU-parlamentano —Maĝorzata Handzlik— renkontiĝis kun EU-Komisionano pri Kulturo, Ján Figel'. Dum sia rendevuo, S-ino Handzlik postulis, ke Esperanto ricevu egalajn rajtojn kun aliaj lingvoj en la eduk-sistemoj en la landoj de la Eŭropa Unio.

LIBERA FOLIO - WWW.LIBERAFOLIO.ORG

La renkontiĝo okazis la 5an de junio en Strasburgo, Francio, pro peto de Maĝorzata Handzlik, kaj estis plene dediĉita al la problemoj de la multlingveco de la Eŭropa Unio.



Ján Figel'

Komence de la renkontiĝo Ján Figel' ŝajne kredis, ke Maĝorzata Handzlik volas enkonduki Esperanton kiel oficialan lingvon de la

Eŭropa Unio. Tiun supozatan proponon, kiu efektive neniam estis farita, li tuj refutis kiel apenaŭ realigeblan.

Praktike, vojo al diskriminacio

La propono kiun Maĝorzata Handzlik efektive volis diskuti estis tute alia, kaj ĝin Ján Figel' traktis tute serioze. Maĝorzata Handzlik atentigis, ke la plimultiĝo de oficialaj lingvoj en EU efektive kondukas al diskriminacio de certaj lingvoj favore al aliaj. *En praktiko ĉiuj lingvoj perdasian rolon, nur la angla iĝas pli kaj pli potenca, kio ofendas la unian principon pri egalrajteco de ĉiuj lingvoj, atentigis*



Maĝorzata Handzlik

Maĝorzata Handzlik.

Laŭ ŝi, la rekomendo ke ĉiu civitano de EU lernu minimume du fremdajn lingvojn ne solvos la problemon, ĉar la plej multaj homoj neniam lernos sufiĉe bone eĉ la unuan fremdan lingvon. Kiel eblan solvon ŝi proponis Esperanton, kiu laŭ ŝi multe faciligus la postan lernadon de dua fremda lingvo.

Oficialaj demandoj al EU-Komisiono

Meze de septembro, du italaj EU-deputitoj el Radikala Partio —nome, Emma Bonino kaj Marco Pannella— direktis tri demandojn al la Eŭropa Komisiono, en rilato kun la lingva diskriminacio favore al la angla kadre de supoza lingva egaleco.

Du el la demandoj havas la saman antaŭparolon:

Premisinte, ke - laŭ raporto komisiita en Francujo far Hcee al profesoro Grin, direktoro de Sred en Ĝenevo - Britujo gajnas, nete, ĝis 18 eŭro-miliardojn jare, danke al super-regado far la angla lingvo, dum instruado de Esperanto ebligus preskaŭ 25-eŭro-miliardan netan ŝparon ĉiujaran.

Małgorzata Handzlik atentigis Ján Figeľ, ke en EU nuntempe nur hungaraj rajtas ne nur studi Esperanton, sed ankaŭ oficiale ekzameniĝi pri ĝi samrajte kun aliaj fremdaj lingvoj. Ŝi proponis, ke ĉiuj eŭropanoj havu la saman rajton.

Esperanto subtenas pluan lingvo-lernadon

Laŭ Małgorzata Handzlik, pluraj studoj pruvis, ke studado de Esperanto efektive subtenas postan lernadon de aliaj lingvoj. Tamen laŭ profesiaj lingvistoj, tia ligo ne estas science pruvita. Kiel pruvon de siaj argumentoj Małgorzata Handzlik citis interalie esplorojn de profesoro Helmar Frank, faritajn en la 1970-aj jartoj. Li tiam esploris la lerno-facili-

gan efikon de Esperanto kiel preparo al la posta lernado de la angla lingvo fare de germanaj lernantoj. Tamen tiuj esploroj ne estis unuanime akceptitaj.

Pluaj kontaktoj

Ján Figeľ tamen ne enprofundiĝis en la sciencajn disputojn, sed opiniis la argumentojn prezentitajn de Małgorzata Handzlik interesaj. *Se tio ĉi estas vero oni povus fari konferencon internacian pri tiu problemo. Estus bone ke la konferencon proponu iu aŭ iuj el la membroŝtatoj*, opiniis Ján Figeľ.

Ján Figeľ kaj Małgorzata Handzlik interkonsentis pri pliaj laboraj kontaktoj rilate la temon.

Jerzy Handzlik en EEU-kunsido

Dum 90a UK en Vilno, estis kunsido de Eŭropa Esperanto-Unio, kiun celis partopreni la pola EU-deputito Małgorzata Handzlik. Finfine, reprezentis ŝin ŝia edzo Jerzy Handzlik, kiu ĉefe parolis pri la traduk servo ĉe eŭropa parlamento.

LIBERA FOLIO - WWW.LIBERAFOLIO.ORG

La unua esperantisto en la Eŭropa parlamentano, Małgorzata Handzlik, devis lastmomente ŝanĝi siajn planojn kaj rezigni pri partopreno en la Universala Kongreso de Esperanto en Vilno. En la marda kunsido de Eŭropa Esperanto-Unio (EEU) Małgorzata Handzlik estis reprezentita de sia edzo Jerzy (Georgo) Handzlik. Li estis poste elektita estrarano de la asocio. Komence de la kunsido de EEU Jerzy Handzlik rakontis pri la lingva situacio en la Eŭropa parlamento.

Laŭ li, 30 procentoj el la eŭropa buĝeto estas uzata por tradukaj servoj. Tamen laŭ oficialaj kalkuloj la kosto de tradukado ĉe ĉiuj EU-institucioj kune estas taksata



Jerzy Handzlik dum sia interveno

PAROLE_A_TOUS.BLOG.LEMONDE.FR

je 0,8 procentoj el la tuta EU-buĝeto aŭ sume 13 procentoj el la administraj kostoj. Eĉ tiuj 13 procentoj tamen ja egalas al 807 milionoj da eŭroj jare, neneglektinda sumo. Eĉ pli rimakinde laŭ Jerzy Handzlik tamen estas, ke spite la elspozatan monon la traduka servo ne sukcesas kontentige kaj ĝusta-

La traduka servo de EU ne funkcias, diris Jerzy Handzlik

tatempe prizorgi siajn taskojn. *La dokumentoj venas al la oficejo de Margareta ĉefe en la angla. La pola versio venas aŭ malfrue, kiam ĝi jam ne validas por diskuti, aŭ ne venas entute, li diris.*

Komenci per malgranda paŝo

Post longa pripensado kaj diskutado kun aktivuloj, Maĝorzata Handzlik kons-tatis, ke oni devas komenci per malgran-da paŝo. *Eble unu el realismaj celoj kiujn ni povas atingi en eŭroparlamento estas la enkonduko de universitataj kaj lernejoj Esperanto-ekzamenoj kaj regu-laj stud-programoj, ne devigaj sed fakul-tativaj, en ĉiuj landoj same kiel en Hungario. En Hungario ĉiam pli da stu-dentoj elektas Esperanton. Ne temas pri enkonduko de Esperanto kiel dua lingvo por ĉiuj, ĉar tio tute ne eblas nun, diris Jerzy Handzlik.*

Esperanto ne ekzistas por EU-depu-titoj

La aliaj anoj de la Eŭropa parlamen-to, laŭ Jerzy Handzlik, apenaŭ scias ion pri Esperanto. Margareta parolis pri Es-peranto kun multaj kolegoj siaj en la par-lamento. Ili tute miras ke ŝi konas la lingvon, ke la lingvo ne mortis. Ili ne vo-las kredi ke ekzistas gazetoj en Esperan-to, kantoj, retpaĝoj. Ili tre miras, kiam ŝi rakontas pri Universalaj Kongresoj. Ili-aj bazaj demandoj estas: ĉu oni povas skri-bi esperante? ĉu oni presis iun libron en tiu ĉi lingvo? Ni devas ilin informi.

Por informi la anojn de la Eŭropa par-lamento UEA tra la oficejo de Maĝorza-ta Handzlik sendis pli ol 700 invitleterojn al ĉiuj anoj de la parlamen-to, petante ilin ĉeesti la kongreson en Vil-no, sed venis neniu [vd. leteron de deputito Inés Ayala sur paĝo 27].

Por memorigi la parlamentanojn pri

Esperanto, Jerzy Handzlik petis ke ĉiuj ĉeestintoj en la EEU-kunsido post la reveno hejmen kontaktu ĉiu sian eŭropan parlamentanon.

Kio estas EEU?

Eŭropa Esperanto-Unio (EEU) estis fondita en 1977 dum la UK en Rejkja-viko. Eĉ pli frue, nome en la Eŭropa Esperanto-Kongreso en Luksemburgo en 1973, estis fondita la antaŭulo de la nuna Brusela Komunikad-Centro, la tiama Eŭropa Esperanto-Centro.

Okazis klopodo reaktivigi Eŭropan Esperanto-Union en Verona, Italio en 1992, kaj denove en Stuttgart, Germanio en 1997. La agado de la organizaĵo tamen estis sporada kaj neorganizita, kaj ĝis nun la asocio kaj ĝia statuto ne estis jure registritaj.

En la eŭrop-unia Esperanto-kongre-so en Bilbao, somere de 2004, la komi-tato de EEU post longaj diskutoj akceptis novan statuton, kiu laŭplane devis esti registrita en Belgio ĝis la fi-no de la jaro 2004. La registrado daŭ-ris pli longe ol atendite, sed nun la proceso estas preskaŭ finita, laŭ infor-moj de EEU. Mankas nur publikigo de la nova statuto en la belga ŝtata gazeto.

La nuna Eŭropa Esperanto-Unio ce-las esti kunlabora organo por la landaj asocioj de UEA en la Eŭropa Unio, sed ne ĉiuj landaj asocioj membras en EEU (HEF jes!). Laŭ la nova statuto, la decida organo de EEU estas la ĝene-rala asembleo, en kiu ĉiu membra aso-cio havas unu reprezentanton. La nova asembleo estis vokita al sia unua kunsido en Vilno la 26-an de julio, kadre de la Universala Kongreso de Esperanto.